

La Progresanto

REDACTIE-
COMITÉ

G. P. DE BRUIN
G. J. DEGENKAMP
F. FAULHABER

**STUDIEBLAD VAN DE BOND
VAN ARBEIDERS-ESPERANTISTEN**
IN HET GEBIED VAN DE NEDERLANDSE TAAL
f 2.- per jaar; f 1.50 voor leden van F.L.E.
Postgiro 331133

W. F. KRUIT
H. KUYT
JAC. LEM JR.
J. VAN SCHEEPEN
H. VELTHOVE

REDACTIE EN ADM.: G. J. DEGENKAMP, ROELANTSTRAAT 4, AMSTERDAM-W.

MALLONGIGOJ EN ESPERANTO

G. P. de Bruin (Daŭrigo)

Okazas foje, ke oni uzas la saman mallongigon por malsamaj vortoj. *Ekz.* povas signifi *ekzemplero* kaj *ekzemple*. La signifo de *trad.* povas esti: *tradukis*, *traduko*, *tradukita* kaj *tradukinto*. *Ps.* oni povas uzi por *pseudonimo* kaj por *pseudonime*. Miskompreno per tio ne facile estiĝas, ĉar ĝenerale la cetera teksto de la frazo montras la ĝustan signifon. Koncerne la mallongigon *ekz.* ni rekomendas uzi *ekz-o* por *ekzemplero* kaj *ekz.* por *ekzemple*.

Kiel signoj de mallongigo servas ordinara punkto kaj streketo (—). La punkto indikas, ke oni forlasas la ceteran parton de la vorto: *lab.*, *proks.*, *t.e.* Streketon oni uzas ĝenerale, se oni ellasas parton inter la komenca(j) litero(j) kaj la fina(j): *s-ro*, *k-do*, *n-ro*. Iuj esperantistoj kutimas tute ne uzi la mallongigan signon. Ili skribas: *sro*, *ktp*, *SAT*, *UEA*. Koncerne la nomojn de asocioj k.s., ĉi tiu metodo jam trovis pli da apliko. Ĉar oni ofte elparolas ilin kiel tutan vorton kaj ĉar miskompreno ne povas estiĝi, niaopinie ne ekzistas motivo por malaprobi ĉi tiun manieron. Ĉe alispecaj mallongigoj la forlaso de la punkto kelkokaze kaŭzus formigon de iom strangaj literkombinoj kiel *ka* (kaj aliaj) *te* (tio estas), *sino* (sinjorino), pro kio tiu metodo, almenaŭ en tiaj okazoj estas nerekomendinda. Unu escepton oni povus niaopinie tamen allasi, nome *ktp*. anstataŭ *k.t.p.*

Nia priskribo ne estus komplete, se ni ne menciis la mallongigon *k* (kaj). Ĝin enkondukis *k-do* Lanti kaj ĝi troviĝas en pluraj S.A.T.-eldonaĵoj, ankaŭ en nuntempaj. Ĉar la nomita vorteto estas multe uzata, oni teorie povas per ĝia mallongigo ŝpari iom da spaco. Sed ĉi tiu argumento niaopinie ne multe varolas, ĉar en la praktiko la spaco ŝparita per mallongigo de „kaj” estos en multaj okazoj perdata, se ĉe la komenco da nova alineo, la antaŭa linio ne estas tute plena. Pro tio ŝajnas nerekomendinde uzi ĉi tiun mallongigon, krom en specialaj okazoj, ekzemple en vortlistoj aŭ aliaj dense presitaj tekstoj. P. Stojan en sia „Bibliografio de Internacia Lingvo” eksperimentis pri anstataŭigo de „kaj” per la signo &, sed ĉi tiu provo ne trovis imitantojn.

Tre verŝajne ne estos eble krei tute regulan kaj unuforman sistemon de mallongigoj. Iuj devioj kaj esceptoj ne estas eviteblaj. Sed tamen restas dezirinde klopodi atingi kiel eble plej grandan regulecon. Pro tio ni, sen pretendo esti trovintaj solvon por ĉi tiu problemo, publikigas ĉi sube provon de sistemo, bazita sur niaj ĉi supraj konstatoj. Ni volonte ricevos rimarkigojn kaj kritikojn de kompetentuloj kaj interesigantoj, precipe de alinaciaj.

administranto
delegito
direktoro
eldoninto

adm.
del.
dir.
eld.

profesoro
tradukinto
Esperanto
literaturo

prof.
trad.
Esp.
lit.

Kun ĝojo ni povas sciigi, ke k-do G. J. Degenkamp bone fartas; la operacio sukcesis. La posta ripozo tiom refortigis lin, ke li jam povis forlasi la malsanulejon. Li nun estas hejme kaj daŭrigas la ripozon.

La redakta komitato.

Dum mia dumonata restado en malsanulejo atingis min tre multaj simpatesprimoj kaj bondeziroj por resaniĝo, eĉ kolektivaj el sekciaj kaj distriktaj kunvenoj kaj el la kongreso en Torino.

Tiu fakto tre ĝojigis min kaj mi esprimas tutkoran dankon al ĉiuj, kiuj dum tiu tempo dediĉis al mi bonfaran penson.

G. J. Degenkamp.

Jus finiĝis milito.

Kio restas?

Nur funebro.

Post tiom da perforto, ambaŭflanke triumfis nur la Morto inter eĉ la venkintoj, kiuj festas.

Laŭdoj, laŭroj, medaloj, ĉio estas masko, trompo, stimulo, la risorto al estontaj militoj, fia sporto kontraŭ kiu, angore, mi protestas.

Kio gvidas en la milita ŝtormo la devigan koleron de l'soldatoj? Militvestoj, krom leĝo, devo, normo.

Sed se, inter venkantoj kaj venkatoj, malaperus, subite, l'uniformo, kiel gapus la moŝtaj aŭtokratoj!..

Lisboa, la 26an de Aŭg. de 1950a.

SALDANHA CARREIRA.

(Akademiano)

inĝeniero	inĝ.	rimark(ig)o	rim.
kasisto	kas.	volumo	vol.
prezidanto	prez.		
Esperanta	Esp.	laborista	lab.
estimata	est.	propaganda	prop.
ilustrita	il.	tradukita	trad.
internacia	int.		
bonvolu turni	b.t.	korespondi	kor.
deziras	dez.	notu bone	n.b.
eldonis	eld.	tradukis	trad.
interŝanĝi	interŝ.	turnu, mi petas	t.m.p.
ekzemple	ekz.	pseŭdonime	ps.
letere	let.	respektive	resp.
proksimume	proks.		
anstataŭ	anst.	ĉirkaŭ	ĉ.
antaŭ Kristo	a.K.	kaj similaj	k.s.
inter aliaj	i.a.	kaj tiel plu	k.t.p.
kaj aliaj	k.a.	post Kristo	p.K.
kaj ceteraj	k.c.	tiel nomata	t.n.
kaj sekvantaj	k.skv.	tio estas	t.e.
ĉeĥoslovaka krono	ĉsl.kr.	sveda krono	sv. kr.
dinaro	din.	svisa franko	sv. fr.
dolaro	dol.	ŝilingo	ŝ.
franca franko	fr.fr.	Est. Sinjoro	E.S.
germana marko	g.m.	Kara Kamarado	K.K.
nederlanda floreno	ned.fl.	Posta Skribo	P.S.
antaŭtagmeze	atm.	poŝtkarto	pk.
bonvolu	bv.	poŝtmarko	pm.
jarcento	jc.	respondkupono	rk.
komparu	kp.	sankta	st.
paĝo	p. aŭ pĝ.	vidu	v. aŭ vd.
posttagmeze	ptm.		

ESPERANTO NATURA LINGVO

Ju pli daŭras Esperanto, des pli ĝi naturiĝas eĉ en nia teoriado. Antaŭ tridek jaroj, ni ĝenerale konsentis ke nia lingvo estas artefarita. Poste, iom post iom, ni trovis ĝin pli kaj pli natura: tial ke ĝiaj elementoj estas el-tiritaj el naturaj lingvoj, tial ke ĝi evoluas idente al naciaj lingvoj, tial ke ĝi estas trovata logika, facila. Sed estas fakto, kiun mi ne vidis ĝis nun elstarigita, kiu eble tion meritas. Mi vere intime konas nian movadon nur en Katalunujo. Tamen, eblis al mi konstati ke estas samideanoj kiuj pli *nature*, pli *facile*, pli *korekte*, pli *elokvente* parolas paroladas aŭ verkas en Esperanto ol en sia hejma. gepatra, lingvo: Guma, Alberich, Masachs, Sola. Poetoj kiel Artur Domech kaj Jaume Grau-Cases estas

tute nekonataj pro verkaĵoj en nacia lingvo. Ĉu ne same okazas en aliaj landoj? Ĉu ekzemple Baghy kaj Kalocsay ne pli bone, facile, nature verkas en Esperanto ol en sia gepatra lingvo? Ĉu en Aŭstralio kaj Finnlando, en Francujo kaj Anglujo, en Nederlando, Polujo, Helenujo kaj aliaj landoj ne okazas same, ne faktas ke iuj esperantistoj pli spontanee kaj facile parolas, paroladas aŭ verkadas en Esperanto ol en sia nacia lingvo? Se tia fakto estus principe konstatebla kiel internacia, eble interese estus profunde enketi kaj ĝin pristudi. Kion vi observis, kion vi scias tiurilate, pri viaj enlandaj samideanoj?

DELFI DALMAU
(Akademiano)

doktoro	d-ro	samideanino	s-anino
doktorino	d-ino	gesamideanoj	ges-anoj
fraŭlino	f-ino	sinjoro	s-ro
kamarado	k-do	sinjorino	s-ino
kamaradino	k-ino	gesinjoroj	ges-roj
gekamaradoj	gek-doj	esperantista	esp-ista
kompanio	k-io	ekzemplero	ekz-o
pastro	p-ro	numero	n-ro
samideano	s-ano		

Koncerne la mezurojn ŝajnas rekomendinde uzi la internacie akceptitajn normigitajn mallongigojn, ne aldonante Esperantan finaĵon. Ili estas:

miriametro	mrm	tuno (1000 kg)	t
kilometro	km	kilogramo	kg
hektometro	hm	hektogramo	hg
dekametro	dam	dekagramo	dag
metro	m	litro	l
decimetro	dm	gramo	g
centimetro	cm	decigramo	dg
milimetro	mm	centigramo	cg
		mililitro	ml
			miligramo
			mg

Por kvadrataj kaj kubikaj mezuroj oni aldonas respektive malgrandan 2 kaj 3: kvadratmetro = m² kubikmetro = m³.

Komento.

En la sesdekjara praktiko, precipe en la gazetaro, la uzado de mallongigoj montras tendencan al ordiĝo. Restas tamen diversaj neregulaĵoj, pro kio ni samopinias kiel k-do de Bruin, ke laŭeble regula sistemo estas celinda. Liaj proponitaj mallongigoj ŝajnas al ni ĝenerale subtenindaj. Ni permesas al ni nur kelke da negravaj atentigoj:

Ni ne komprenas, kial la senbaza escepto *ktp* estus allasinda anstataŭ la regula *k.t.p.* Uzado de senpunktaj mallongigoj de organizaj nomoj en kelkaj gazetoj okazis laŭ nia scio precipe pro teĥnikaj motivoj.

Ni preferas la jam kutimajn *k-dino* kaj *gek-doj* anstataŭ *k-ino* kaj *gek-oj*. Ŝajnas al ni sensukcese proponi novan formon kontraŭ forte radikintan. Krome *gek-doj* estas analogia al la aprobita *ges-roj*. Red.

POR KOMENCANTOJ

H. Kuit.

Vertalingen zende men voor de 10e van de volgende maand aan het redactie-adres Roelantstraat 4, Amsterdam-W.

DE CORRELATIEVEN V.

In vorige nummers werden behandeld de correlatieven, die uitgaan op de letters: o, u, a en es. Al deze woordjes zijn voornaamwoorden. De overige correlatieven zijn bijwoorden. Deze gaan uit op: e, al, am, el en om. De correlatieven op e zijn bijwoorden van plaats.

Ie = ergens, een onbepaalde plaats. *Ie en la salono mi perdis mian fontplumon.* Ergens in de zaal heb ik mijn vulpen verloren. *Miaj geavoj loĝas ie en la vilaĝo.* Mijn grootouders wonen ergens in het dorp. *Kie* = waar, op welke plaats? *Kie mi jam renkontis vin?* Waar heb ik je reeds ontmoet? *Mi ne plu scias, kie ili loĝas.* Ik weet niet meer, waar zij wonen.

Kie kan ook betrekking hebben op een reeds genoemde plaats, het is dan een betrekkelijk bijwoord (rilata adverbo), bijv.: *Li loĝas en la domo, kie antaŭe loĝis liaj gepatroj.* Hij woont in het huis, waar vroeger zijn ouders woonden. *En la urbo, kie estis malsato, mortis multaj homoj.* In de stad, waar hongersnood was, stierven vele mensen.

Tie = daar, op die plaats. *Tie loĝas miaj gepatroj.* Daar wonen mijn ouders. *Kie estas mielo, tie muŝoj ne mankas.* Waar honing is, ontbreken geen vliegen.

Ĉie = overal, op elke plaats. *Ĉie oni renkontas esperantistojn.* Overal ontmoet men esperantisten. *Oni propagandu Esperanton ĉie.* Men moet overal Esperanto propageren.

Nenie = nergens, op geen enkele plaats. *Nenie li povas trovi ripozon.* Nergens kan hij rust vinden. *Mi nenie povas trovi miajn okulvitrojn.* Ik kan nergens mijn bril vinden.

Aangezien de correlatieven op e betrekking hebben op een plaats, kan er sprake zijn van een richting naar die plaats. Is dit het geval, dan gebruikt men de richtings N, bijv.: *La knabo malaperis ien.* De jongen verdween ergens heen. *Kien li iris?* Waar ging hij heen? *Tie estas malbone, do vi ne iru tien.* Daar is het slecht, U moet daar dus niet heengaan. *Kien vi sendis tiun libron?* Waarheen hebt U dat

boek gezonden? *Nenien mi sendis ĝin.* Ik heb het nergens heen gezonden. *Ter vertaling. Opgave 10.*

Waar heb je dit boek gevonden? Als ik tijd had, reisde in overal heen. Weet je de boekendienst te vinden? Ga daarheen en koop een mooi boek. Waar een wil is, is ook een weg. Hij gaat overal alleen heen. Wat doet hij daar? Hij loopt door de kamer heen en weer. In het land, waar hij woont, is het onrustig. Ergens in die straat woont kameraad Jansen, de voorzitter van onze afdeling.

Vertaling van opgave 8.

Li difektis 1) ies libron. Tiu viro ofte disputas 2), li respektas nenies opinionon. La knabo, kies patron 3) mi jam longe konas, pasigis 4) sian ferion 5) ĉe ni. Pri kies laboro vi estas malkontenta? Ĉies helpo mi volonte akceptus 6), se oni proponus 7) ĝin. Johano estas kapabla 8) esperantisto; kial vi neniam agis 9) laŭ ties konsilo? Estas necese 10), ke ni akceptu 11) ĉies kunlaboron. La anojn 12), kies taskoj estis bonegaj, ni gratulis.

1) Niet: *defektis, difektigis; difekti* is een overgankelijk werkwoord, maakt men dit met *igi* dubbel overgankelijk, dan laat men een ander de handeling verrichten. 2) Ook: *havas ofte malpacon. Kvereli* is te zwak, d.i. kibbelen. 3) Niet: zonder N; dit is een bepaling zonder voorzetsel. Ontleed U de zin eens! 4) Ook: *trapasis*; dit is echter minder gebruikelijk. Niet: *pasis; pasi* is onovergankelijk, bijv.: *la tempo pasas rapide.* 5) Ook: *libertempon.* 6) Niet: *akceptas*; hier is sprake van een handeling, welke niet tot stand komt, omdat de voorwaarde (proponi helpo) ontbreekt. 7) Ook: *prezentus.* Minder juist: *oferi*; d.i. offeren. Niet: *ofertus; oferti* = offerte maken, aanbieden van koopwaar; een handelsterm dus. 8) Ook: *sperta.* Niet: *lerta*; d.i. handig. 9) Ook: *akceptis ties konsilon.* Een woordelijke vertaling is: *sekviz ties konsilon*; niet aanbevelenswaardig dus. 10) Niet: *necesa*; d.i. een onpersoonlijke zin. 11) Niet: *akceptas*; in *esti necese* ligt een wens opgesloten. 12) Niet: *anoj*; dit is een samengestelde zin; elke volzin wordt apart ontleed. Ontleed U eens: *La anojn, . . . , ni gratulis!*

Beoordeling:

Astor 9; J. H. te A. 10; J. J. t. H. te D. 9; J. J. B. te D. 9; J. v. H. R. te A. 8; A. A. D. te Z. 7; A. T. te R. 5; E.

DE WERKWOORDEN

G. J. D.
DE WENSENDE WIJS
(Vervolg)

Ook in het Nederlands zijn er nog overblijfsels van oorspronkelijke vormen te vinden. En die afzonderlijke vormen maken ons het aanvoelen van een aanvoegende wijs natuurlijk nog moeilijker. Het heeft geen zin de verschillende wijzen afzonderlijk te bespreken, omdat onze „wensende wijs” niet zo systematisch in onderdelen te behandelen is. Die onderdelen vloeien a.h.w. ineem. En ook dit is ongetwijfeld een motief van Zamenhof geweest ons geen wijzen te leren, wier begrenzing ons niet altijd duidelijk is.

Slechts in het voorbijgaan zullen wij die wijzen noemen:

- 1e. Imperatief of gebiedende wijs (*kom — venu*), waarvan zelfs nog een versterkte vorm (jussief) bestaat.
- 2e. Subjunctief of aanvoegende wijs (*hij wensde, dat ik kwam — li deziris, ke mi venu*).
- 3e. Optatief of wensende wijs (*leve Esperanto — vivu Esperanto; moge het u welgaan — bone prosperu al vi; het zij zo — estu tiel*).
- 3e. Adhortatief, opwekkende of aanspoerende wijs (*laten wij gaan, laat ons gaan — ni iru*).
- 5e. Dubitatief of weifelende wijs (*wat zullen wij doen? — kion ni faru?*)

Achtereenvolgens zullen we onze aandacht wijden aan de gebiedende wijs, de bijzonderheden van de aanvoegende wijs, en tenslotte aan de verschillende gevallen, die een nadere verklaring behoeven.

4. *De gebiedende wijs.*

Men weet, dat de gebiedende wijs in het Nederlands bestaat uit de stam van het werkwoord. Is het gebod tot meer dan één persoon gericht, dan stam plus *t* (*spreek — spreekt*). Dit onderscheid is natuurlijk niet altijd even duidelijk te maken, omdat b.v. in geschrift men niet altijd weet, of men tot één of meer personen spreekt. Het is dus heel goed, dat in Esperanto zulk 'n onderscheid niet bestaat. Wel wordt in enkele verouderde leerboekjes gezegd, dat het meervoud de toevoeging van de toegesproken persoon (*vi*) eist (*vi parolu*). Dat is niet juist.

A. B. te A. 9; D. P. te A. 9; J. F. v. D. te A. 9; G. A. te R. 10; J. A. V. te U. 8; London 9; J. G. v. d. P. 6; Th. B. te A. 8; C. v. B. te S. 8; Tilio 6; J. J. D. te L. 10.

Die toevoeging is wel bruikbaar, maar om een geheel andere reden. Als b.v. een onderwijzer een verzoek richt tot een bepaalde leerling, kan hij dat door een gebaar duidelijk maken en zeggen: *vi diru tion*, opdat de anderen weten, dat niet zij bedoeld zijn.

Een gebod of wens wordt in het Nederlands ook op andere wijze uitgedrukt dan in een gebiedende wijs, b.v. in een onbepaalde wijs (*opletten! stil zitten! zwijgen! niet roken!*), met een deelwoord (*verboden te roken, gezwegen, niet gezanikt!*). In beide gevallen bezigt men in Esperanto toch de gebiedende wijs (*zwijgen — silentu!*), ofschoon er wel voorbeelden in onze literatuur zijn van een onbepaalde wijs als gebod (*atenti!*). De zelfstandige vorm *silenton!* is gebruikelijk.

In een gebod kan zelfs het werkwoord helemaal ontbreken (*geen grappen! de wapens neer! weg met dit of dat!*). Men vertale dan naar eigen inzicht: *ne faru spritajojn! for la batalilojn!*.

Omdat voor een verzoek de gebiedende wijs zonder meer te hard zou klinken, verzacht men het gewoonlijk door toevoeging van *mi petas* (*donu tiun libron al mi, mi petas*), of door de werking zelf in de onbepaalde wijs te plaatsen en ze te doen voorafgaan door de gebiedende wijs van *voli* of *bonvoli* (*bonvolu doni al mi tiun libron*).

5. *De aanvoegende wijs in een hoofdzin.* Komt de aanvoegende wijs in een hoofdzin voor, dan gebruiken we in het Nederlands of die wijs, of we vervangen ze door een modaal hulpwerkwoord (*hij doe zijn plicht of laat hij zijn plicht doen; hij verwijdere zich of hij moet zich verwijderen; hij ga zijn gdng maar of hij moet zijn gang maar gaan; mijnheer kome binnen of mijnheer kan binnen komen*). Alle gevallen eisen in Esperanto de aanvoegende wijs: *li faru sian devon; li foriru; li agu laŭvole; sinjoro bonvolu eniri*.

De aanvoegende wijs wordt in het Nederlands zelden gebruikt, maar zelfs als ze gebruikt is, is ze nog niet steeds als zodanig te herkennen. In het enkelvoud is b.v. het werkwoord *leren*: *ik lere, gij leert (leret), hij lere*, maar in het meervoud: *wij en zij leren. Leert en leren* zijn dus gelijk aan de tegenwoordige tijd. Misschien is dit wel mede oorzaak, dat de aanvoegende wijs uit ons spraakgebruik verdwenen is.

(Wordt vervolgd)

DE KOMENCANTO AL PROGRESANTO

Jac. Lem.

Zich aan zijn plichten onttrekken.

Slecht verlicht.

De tranen sprongen haar in de ogen.

Onderscheiden (waarnemen).

Waar niet is heeft de keizer zijn recht verloren.

Wat door de vingers zien.

Voorbode.

Aangrenzend.

Eerst de kat uit de boom kijken.

Al wat je zegt, laat mij volkomen koud.

Zijn schapjes op het droge hebben.

Niet op alle slakken zout leggen.

Berokkenen.

Angstaanjagend.

Gods water over Gods akker laten lopen.

Niet graag in iemands schoenen staan.

Overijld.

Bij iedereen in het krijt staan.

Onze ogen waren aan de duisternis gewend.

Opgave 9.

1. Hoewel hij het doet voorkomen zijn schapjes op het droge te hebben, zou ik niet graag in zijn schoenen staan, want hij staat bij iedereen in het krijt. 2. Wees voorzichtig, kijk eerst de kat eens uit de boom, want overijld handelen, kan ons veel schade berokkenen. 3. Al, wat je zegt, laat mij volkomen koud. Je zoekt altijd uitvluchten om je aan je plichten te onttrekken en laat Gods water maar over Gods akker lopen. 4. Je moet wel eens wat door de vingers zien. Ieder heeft zijn gebreken en jij zelf bent ook niet feilloos. 5. Een ondragelijke hitte en een angstaanjagende stilte waren de voorboden van een hevig onweer, dat, nog vóór wij het dorp hadden bereikt, boven onze hoofden losbarstte. 6. Toen zij door de luidspreker de stem hoorde van haar zoon, die zij in jaren niet had gezien, sprongen haar de tranen in de ogen. 7. In een van de aangrenzende straten vonden wij het huis, dat wij zochten. In de slecht verlichte kamer was het ons haast onmogelijk iets te onderscheiden. Toen onze ogen enigszins aan de duisternis waren gewend, zagen wij een onbeschrijfelijk toneel van armoede en ellende. 8. Wat kunnen wij van hem eisen? Geld om zijn schulden te betalen bezit hij niet en waar niet is, heeft de keizer zijn recht verloren.

Ne fari siajn devojn.

Malhele lumigita.

La larmoj kolektiĝis en ŝiaj okuloj.

Percepti.

De nehavanto eĉ reĝo nenion ricevas.

Ne en ĉiu afero esti tro severa.

Antaŭsigno.

Limtuŝanta.

Antaŭ ĉio vidi kien kuris la leporo.

Ĉio, kion vi diras, tuŝas min, kiel akvo anseron.

Esti komforte riĉa.

Ne ĉiujn erarojn atenti.

Kaŭzi, okazigi.

Timtremiga.

Lasi ĉion al la hazardo.

Ne volonte esti en ies loko.

Tro rapida(e).

Al ĉiu ŝuldi monon.

Niaj okuloj adaptiĝis al la mallumo.

Vertaling van opgave 8.

1. Li longe paroladis, sed tio, kion li diris, estis preskaŭ sensignifa. 2. Li estas lerta kaj diligenta knabo. Kredu min, iom post iom li atingas la celon. Li scias la vorton de la leterseruro. 3. Mi suspektis lin. Mi tuj sentis (komprenis), ke sin kaŝas vipero en la herbo, tial mi estis singarda kaj ne multe respondis. 4. Se ni ĉion konsideras, ni ne havas plendmotivon (kialon por plendi) pri la fervoro kaj la konduto de via filo. Se li daŭrigos, fari sian eblon, li certe fariĝos (estiĝos, iĝos) unu el la plej bonaj de la klaso. 5. Nun ĉesu. Vi ĉiam ĉikanas min. Per kio mi ĝenas vin? Lasu min trankvila (ne ĝenu min) kaj okupu vin per viaj propraj aferoj. 6. Kvankam vi ne meritas tion, mi volonte kaŝos ĉion per mantelo de kompato, sed faru al mi la plezuron de nun (estonte) eviti la kuneston de homoj (personoj, uloj), kiuj klopodas manĝi el du raŭfoj. 7. Vi ne ĉion diru en la ĉesto de infanoj. Etuloj aŭdas eĉ tra la muroj. 8. Kvankam mi urĝe estis avertinta lin, li tamen agis laŭ propra plaĉo. Ke li post iom da tempo revenos ĉe mi kiel hundo kun la vosto inter la kruroj, pri tio mi estis absolute certa. Bonvolu korekti: p. 61a, 2a kolono, 6a linio de supre: Pli bone estas reire, d.e. Pli bone estas reiri.

OPINIOJ EL NIA LEGANTARO

La embaraso pro diferencaj signifoj, kiujn oni diverslande atribuas al gramatikaj kaj kelkaj aliaj terminoj, pruviĝas pli kaj pli granda. Sekve de jam publikigitaj leteroj ni nun i.a. ricevis de s-ro Juan Régulo Pérez en La Laguna, Kanariaj Insuloj, interesan leteron, el kiu ni ĉerpas:

„La universala gramatika termino por la Esperanta *propozicio* hispane estas *oración* (Nia *volzin*. Red.). Ĝi povas esti ĉefa kaj *dependa*, kaj la kuno de ĉefa(j) kaj *dependa(j)* *oraciones* ricevas la nomon *oración compuesta* (= *kompleksa propozicio* (Nia *zin*, Red.). La vorto *frase* ekzistas hispane, sed ĝi ne estas gramatika termino, sed nomo por vortgrupo, esprimaĵo, ĉefe kiam ĝi ne konsistigas plenan *propozicion*. La vorto *proposición* hispane signifas kion proksimume Esperante *aserto*; ĝi estas faka termino de la logiko, de la retoriko kaj de la dialektiko, sed *ne* de la gramatiko. La hispana vorto *sentencia* estas faka termino de la jura lingvo, kiu ĝenerale signifas proksimume kion en Esperanto *verdikto*. La hispana kláusula estas jura kaj gramatika faktermino, ĉefe uzate en la jura lingvo. Ĝia gramatika signifo estas proksimuma al tiu de la Esperanta *frazo*, sed en tiu senco ĝi ne estas multe uzata.

„Resume: kion Esperanto esprimas per la vortoj *frazo* kaj *propozicio* la hispana lingvo esprimas per la sola vorto *oración* (plurale *oraciones*). *Oración* povas esti ĉefa kaj *dependa*, *simpla* kaj *malsimpla* (kompleksa). *Frase*, *proposición*, *sentencia*, *kláusula*, *periode* (=kláusula), k.t.p. ekzistas en la hispana, sed kun teĥnikaj signifoj, kiuj ĝenerale ne koncernas, almenaŭ ĉefuze, la gramatikon.

„*Verso* signifas hispane *verso*, *poemo*, kaj ankaŭ *linio*. Sed la signifo, *linio* estas pli faka; ĝenerale *verso* (hispane ankaŭ *verso*, prononcata *bérso*) estas *verso*, *poemo*. La vorto strofo (hispane *estrofa*) havas la saman signifon, kiun en Esperanto”. Ŝajnas al ni, ke la signifo de la hispane *proposición* kongruas kun la angla *proposition*; sed por la anglaj *sentence* kaj *clause* la hispanaj vortoj *sentencia*

kaj *kláusula* ne donas kontentigan solvon. Oni komparu la ĉi suprajn klarigojn kun la difinoj de s-ro Butler:

„*Frazo* (angle: *sentence*) estas la esprimo de kompleta penso. Ĝi konsistas el subjekto kaj predikato kaj povas esprimi aserton, demandon, deziiron aŭ ekkriion.

„*Propozicio*” (angle: *proposition*) estas iom malpli vastsignifa; ĝi signifas frazon ĵesan aŭ nean. Ĝi estas iom formala vorto uzata de gramatikistoj kaj logikistoj.”

Atentinde estas, ke s-ro Butler jam ricevis diversajn leterojn, kiuj ĉiuj surprize subtenas lian proponitan *kláuzo* por *subfrazo*. S-ro Butler diras, ke „Ŝajne P.G. uzas *propozicio* kun la du signifoj a. *frazo* kaj b. *kláuzo* (subfrazo), sed ĝi diras, ke frazo povas konsisti el unu aŭ pluraj *propozicioj*. Tre neklara”. Ni nepre rekomendas tiun ĉi malfacilaĵon al la atento de la Esperantista Akademio kaj al la reviziantoj de P.V..

La malfacilaĵo fariĝas ankoraŭ pli vasta. S-ro Stop-Bowitz skribas al ni, bonvole plenumante nian tiurilatan peton:

Laŭ P.V. *predikato* estas „adjektivo aŭ substantivo esprimanta kvaliton, kiun oni atribuas per helpo de verbo al subjekto aŭ al objekta komplemento.” En la norvega lingvo la predikato estas la verbo en la frazo.

„Kaj kiom da malegaleco estas inter la signifoj de la „akademias” titoloj en diversaj lingvoj! Se franco skribas pri *profesoro*, li pensas pri ĉia instruisto, dum norvego pensas pri la plej altranga universitata instruisto kaj sciencisto. Se franco aŭ norvego skribas pri *konservatoro*, li pensas pri sciencisto oficanta en muzeo (anglo nomus tian personon *kuratoro*), dum anglo, svedo, dano k.t.p. pensas pri teĥnika asistanto en muzeo aŭ laboratorio, kiun norvego nomus *preparanto*! Regas pri tiu ĉi temo terura ĥaoso, kiun oni nepre devas reguligi, ĥonante al la Esperantaj vortoj difinitajn signifojn. Tio eble eĉ iom post iom povus regulige influi al la nacilingva ĥaoso.” G. J. D.

Beoordeling:

Astor 9; E.A.B. en A. 10; J. J. B. en D. 8; A. J. G. en D. 8; J. A. V. en U. 5; D. P. en A. 7; J. F. v. D. en A. 9;

J. F. D. en L. 9; G. A. en R. 7; J. G. v. d. P. en U. 6; J. v. H.-R. en A. 7; J. H. en A. 8; J. V. en G. 9; T. B. en A. 9; Tinjo 8; Pokaleta 8.

POR PROGRESANTOJ

J. van Scheepen.

Opgave 10. Vertaal in Esperanto:

In 1914 kon een mij toebehorende hollandse herder niet langer door mij verzorgd worden — vanwege de mobilisatie — en hij werd daarom door mij afgestaan aan iemand in Avenhorn (bij Hoorn). Ik woonde destijds in Breda en de hond werd in een kist per spoor naar het Noorden verzonden. Op het erf vrijgelaten zwom hij echter subiet over een brede sloot en vluchtte naar het Zuiden. Hij zou zeker in Breda zijn teruggekeerd ware het niet, dat hij door Purmerend kwam, waar mijn vader woonde, die de hond in Breda eenmaal had gezien. Maar het geheugen en... de neus van een herder zijn puik in orde en dies bleef hij in de buurt zwerven! Vader schreef mij (ik was toen gemobiliseerd in Brabant), dat hij meende „Duc” gezien te hebben en toen ik kwam, bleek dit juist te zijn. De hond was danig uitgeput, ook al omdat men had getracht — uiteraard te vergeefs — deze mooie hond te vangen. Hij week niet van mijn zijde en hoewel hij als een blok neerzeeg en sloop was hij direct wakker als ik even van mijn stoel opstond.

T. D. Sigling, dierenarts.

Vertaling van opgave 8.

DUM VOJAĜO 1).

Kiu 2) ekvojaĝos estu tiom prudenta (en) kaj en sian bezonon krom 3) ves-toj paki aliaj bezon(at)ajoj, kelkajn

librojn. Kelkfoje post multa admiro al la naturo kaj (al) artaĵoj, oni sentas la bezonon pri distro, ankaŭ kelkfoje la plej rapida trajno 4) la plej gaja banleketo ja donas 5) la seniluziigon, ke ĉio tamen ne estas tiom malproksima kaj bela 6) kiom oni supozis 7). Krome 8), vespere 9) kiam estas nenio, kion oni povas admiri, oni povus pro enuo iniciati 10) ĝenadon 11) al societo per sia opinio koncerne aferojn kaj homojn pri kiuj neniu intereso (iĝ)as 12). Prefere ol rompi la plezuron 13) de aliaj 14) oni lasu 15) sin konduki per 16) libro al landoj, kie certe estas bele.

1) Niet: *sur*. 2) Ook: *Tiu, kiu*. 3) Niet: *escepte*, want dit sluit uit. 4) Ook: *vagonaro*. 5) Ook: *prezentas*. 6) „Malproksime” is een bepaling van plaats: „Bela” is een bijvoegelijke bepaling van „ĉio”. 7) Ook: *atendis*. 8) Ook: *Krom tio*. 9) Ook: *Dum la vesperoj*. 10) Ook: *veni al ĝenado de*. 11) Ook: *maloportuno*. 12) Ook: *interesus sin*. 13) Ook: *plaĉon*. 14) Ook: *aliuloj*. 15) Niet: *igu*. *Oni lasu, ke libro...*

Beoordeling:

J. H. te A. 9; F. B. R. te A. 8; C. J. P. te Z. 8; Kortbirdo 8; Pinokio 8; Adèle Lernanto 7; K. S. te Z. 6; A. A. D. te Z. 7; A. P. M. L. te G. 8; A. J. G. te D. 6; Astor 8; T. M. te 's-Gr. 7; Pokaleta 7; J. V. te 's-Gr. 7; Th. B. te A. 8; J. F. N. te L. 8; G. A. te R. 7; D. P. te A. 6; E. A. B. te A. 8; J. F. v. D. te A. 9; J. J. B. te D. 6. (Vian antaŭan taskon ni bedaŭrinde ne ricevis).

NEOLOGISMOJ

Neologismoj, ĉerpitaj el „La Perfido”. (Daŭriĝo)

kaplano — sacerdoto, helpanto de parohestro (kapelaan)

mortifiki — bridi siajn malmoderajn pasiojn por pentofari kaj akiri regon super si mem (versterven)

panduro — ia kartludo (pandoer)

penitenco — preĝo aŭ bonfaro, kiun konfespreninto diktas al konfesinto (penitentie)

predo — ĉaskaptaĵo (buit)

rubekolo — kantbirdeto (roodborstje)

simuli — trompe ŝajniĝi (simuleren)

spergulo — furaĝa vegetaĵo el la familio kariofilacoj (spurrice, Spergula arvensis)

tenaca — ledeca, malfacile ŝirebla; fig.: persistema, malfacile venkebla (taai) trista — melankolie, deprime malgaja (triest)

zostero — marvegetaĵo el la familio najadacoj (zeegras, Zostera marina)

„LA NEVENKEBLA ĜENO”,

Th. Thijssen

reversi — rekudri uzitan veston tiel, ke la interna flanko de la ŝtofo iĝas la ekstera (keren)

